

LERNEJOJ:

paĝo du

Ĉi tiu sfero speciale suferis pro malpliigo de persona agado fare de la kutimaj laborantoj; neniuj Ejanzanoj povis doni daŭran helpon en klasĉambro, kaj tiu situacio restos dum la antaŭvidebla estonteco.

Do, ni devas agadi laŭ nerektaj metodoj, la plej urĝa el kiuj estas provizo de taŭgaj legaĵoj. En ĉi tiu rilato, "Lerta Leganto" pravigas mankon de persona agado.

Alia kuraĝiga afero estas la grandamasa respondo al la NZEA lerneja ekzameno, kiu allogis 250 partoprenantojn. Pluraj el tiuj venis de la Alt-lerneja nivelo, kiu estas ne traktata en la nuna sistemo. Ejanz subtenas (finance, se necese) la enkondukon de Alt-lerneja ekzameno kaj premio ek de 1971. La premioj ŝanĝiĝis de senpaga ĉeesto de Kongreso al senpaga ĉeesto de Ejanz tendaro, kiu estos pli taŭga sperto por la junuloj. Ĉi-jare, la kutima Ejanzaro bonvenigos tri-gajnantojn en ĝian viglan rondon. Ĉi tiu estas preskaŭ la sola projekto kiu celas naciskalan enkondukon de nevoj en la movadon kaj tial meritas subtenon. Tia projekto estas starigita precipe pro ĝiaj long-daŭraj efikoj, sed la unuaj gajnantoj de la premio ĉe Blenheim venis de Awahou South kaj ankoraŭ viglas kun ni. Sen la sekva afableco de la Esperantistoj en ilia distrikto, ni ne povus okazigi niajn tendarojn, kiuj tiel profunde kaj agrable ŝanĝis la agad-programon kaj filosofion de Ejanz, kaj ankaŭ provizas taŭgan premion por gajnontoj el la lernejoj.

Ejanz ankoraŭ pretas helpi lernejojn pri legaĵoj, konsiloj, ktp. Bonvolu kontakti nin. Certigu, ke ni scias pri ĉiuj lernejoj kiuj instruas aŭ interesigas pri Esperanto.

ALILANDA KONTAKTO:

Denovo, ĉi tie, kvieta jaro. Fluo de informo de TEJO pliboniĝas, sed kontakto kun alilandaj landaj-sekcioj malpliĝis. Raporto pri nia unua tendaro aperis en novaj-bulteno de TEJO, sed nenie alie. Ĉi jare, ni esperas dissendi la jar-raporton kaj la tendar-raporton pli vaste kaj frue. Ni ankaŭ esperas restarigi kontakton kun ĉiuj 25 landaj sekcioj de Tejo, per sendo de NZEA poŝtkartoj pro la Semajno de Internacia Amikeco, la 19a-25a de Februaro. Estas necese, ke ni certigu daŭran kontakton per la interŝanĝo de gazetoj, broŝuroj, ktp.

pago kvar

OKAZAĴOJ!


La pravigo de niaj okazaĵoj estas, ke homoj pli valoras, ol iu organizo, ol papero. La plej bona metodo por certigi estontecon por Ejanz estas krei spiriton de Ejanz; nur la anoj povas proviziti tion. Se la spirito estas favora, estu ĝi lingva sesio sub arbo en la suno, sep personoj en remboato veturantaj en ĉiam malpli-

grandiĝantaj cirkloj sur la haveno ĉe Karitane, komuna kantado kaj manĝado apud la Raumai ponto, ni do celos rekrei tiun spiriton, kaj enkonduki novulojn en ĝin: tie kuŝas nia estonteco.



Nia unua okazaĵo estis la Unua Tendaro ĉe Shearers Quarters" en Awahou South, kun 18 ĉeestantoj. Post tio, dum Marto, kvin junuloj veturis de Christchurch ĝis Karitane (200 mejloj for) por semajnfino kun la junuloj de Dunedin, kaj tre ĝinda promenado sekvita de mozaika koncerto kun 35 el la Dunedin plenaĝulaj Esperantistoj. En Majo, grupo de sep vojaĝantoj veturis de Wellington al Palmerston North, Awahou South, Masterton,

kaj ree al Wellington. (denove 200 mejloj) per la 1929 Ford A. Ankaŭ la klubo ĉe Te Awamutu ricevis vizitanton. Tiuj pli izolitaj kluboj meritas kaj bonvenigas pli da kontakto kun la nacia movado. Entute 70 klubanoj de la tri kluboj prezentis kaj ricevis neniam - enua - momentan programon. Post fidela portado de naŭ personoj trans la lasta ravino al Awahou, la ŝarĝaŭto tuis kaj mortis sur la Rimutaka Montoj.




Tamen, por provizi 900 mejlojn da transporto al la 36-a Kongreso kaj al nia plej grandioza okazaĵo, la Dua Tendaro, 1948 Chev. estis aĉetita de membroj. La dua tendaro similas al la unua, sed enhavas unu pluan tagon, kun pli regulaj kaj planitaj lingvaj sesioj, unua-nokta kaj Nov-jara danco, ekstera manĝado, promenegoj, kaverno-esplorado, sportoj kaj naĝado. Aldone al la lingvaj sesioj estos ne-preparitaj paroladoj, diskutoj, debatoj, konkursoj, ludoj kaj ankaŭ



preparitaj paroladoj. Tiuj lastaj estas precipe pri tre praktikaj temoj, kaj enkondukos aktivojn en verkado, poezio, dramo, muziko, dancado, pentrado, ktp. La rezultoj de tiuj aktivoj prezentiĝos dum koncerto por la lokaj loĝantoj, kaj poste ĉe la kongreso. Ni celas prezenti diversan, interesan programon kiu instigos ĉiujn profunde partopreni kaj ĝui la sperton.

Sume, 1970 estis elstara jaro pro niaj kelkaj "gasaj okazaĵoj".



FINANCOJ:

paĝo ses

Detala financa raporto prezentigis ĉe la Kongreso; sufiĉas diri, ke en la kaso troviĝis, je la 30a de Septembro, proksimume \$ 370, do \$ 80 pli ol je la fino de la pasinta financa jaro. Alivorte, ni sukcesis gajni profiton, spite al grandaj elspezoj rilate publikecon, kaj spite al buĝeta prognozo de perdo de \$40. Niaj enspezoj venis ĉefe de kotizoj (\$40), Marŝa premio (\$50) kaj vendo de libroj (\$38).

Kontoj por "Lerta Leganto" ĝis la 30-a de Septembro, 1970:

EN	\$	115.00	Donacoj	
		16.50	Vendoj en NZ	
			Pago por No 1 (1,000)	35.20
			Banko	96.50
	\$	<u>131.50</u>		\$ <u>131.50</u>

Depost la 30a de Septembro, ni pagis \$49.20 por 1,500 ekzempleroj de "Lerta Leganto, 2", sed ni havas proksimume \$9 da kredito ĉe UEA, kaj \$3 ĉe BEA, kaj S-ro Markarian ŝuldas al ni \$61.80.

LA MEMBRARO

La membraro daŭre kreskas kontentige. Ni rekomendas membrecon al vi ĉiuj.

	(1965)	(1966)	(1967)	('68)	('69)	(1970)
Junularaj	14	24	23	48	47	60
Apogantaj	-	6	7	10	20	16
Dumvivaj	-	-	3	5	10	10
Honoraj	-	-	-	-	-	4
ENTUTO	14	30	33	63	77	90

PLENAĜULOJ: Konatiĝu kun la mondo de la junularo!

Subtenu la agadon de la junularo!

Apoganta

membreco: \$1

Ricevu la gazeton de la junularo!

JUNULOJ:

Aliĝu aŭ realiĝu al Ejanz. Venu al la okazaĵoj!

0-14 jaroj: 50c. 15-18: \$1.00. 19-25: \$2.00.



PRESAĴOJ:

paĝo sep

Nia oficiala gazeto, "Junularo" aperis sesfoje dumjare, kun entute sesdek ok paĝoj (52 paĝoj kaj "Niaj Roluloj" dum 1969) kiu ampleksis 18.89 kvadratajn futojn aŭ 2,720 kvadratajn colojn da paĝ-spaco. 22 el tiuj paĝoj estis speciale verkitaj por lernejoj kaj lernantoj. Kvin-nivela vort-listo aranĝita laŭ ofteco de uzado, nova vort-ludo kaj bild-rakonto estis unufoje prezentitaj en tiuj paĝoj.

Sen iu radikalaj ŝanĝoj, freŝaj enhavoj kaj prezent-metodoj enkondukiĝis - la jena raporto donas ekzemplojn de la laste menciitaj. "Junularo" enhavis novaĵojn ne raportitajn aligazete; pri nia tendaro, la Karitane kaj Maja Renkontiĝoj, la gajno de \$ 50 ĉe marŝada konkurso. Ni ankaŭ presis longan artikolon de Haruĝiro Mijazaki pri liaj pensoj pri Nov-zelando kaj Esperanto.

Finance, "Junularo" tute konfuzis niajn pesimismajn prognozojn. La kosto por la pasinta jaro estis nur \$9 (\$11 dum 1969) kaj ankoraŭ restas ŝablonoj kaj papero. Ĉi tiu modesta sumo estas rezulto de zorga aĉetado de malnova stoko, je malnovaj prezoj, sed ĉiufiankaj prezaltiĝoj, speciale de poŝt-kosto, kune kun la neceso reordigi la eldono-sistemon, necesigas pesimisman averton pri la kosto en la venonta jaro.

Ne konsternite pri tio, la jar-fina "Junularo" aperis kun rozkolora koverto, postulante, ke "Tendaro estas EN, en via menso!" La gazeto certe estas preta por entuziasme trakti sian sesan jaron de presado.



Krom kantaro, nova ludo nomata "Ĉeno", kelkaj krucvorteniĝoj, kaj ĉi tiu raporto, ĉiuj el niaj streboj en la kampo de "aliaj presaĵoj" videbliĝis en nia plejgrava kaj daŭra projekto, "Lerta Leganto" La unua numero aperis en Majo, la dua en Oktobro, ambaŭ kun ok paĝoj. Numeroj tri kaj kvar espereble aperos en proksimume tiuj samaj monatoj, ĉi jare, kaj plejeble ambaŭ ampleksos dek du paĝojn.

La gazetoj enhavas rakontojn, teatraĵojn, kartunojn, demandojn, ekzercojn, problem

paĉo ok

kaj vort-enigmojn, ĉiuj strikte gradigitaj en vort-uzo kaj gramatiko por akompani ĉapitrojn el "Secondary School Esperanto (vol 1)" de R.H. Markarian kaj J.H. Sullivan (UTP), kiu estas rekomendita lerno-libro de la NZ Asocio de Esperantaj Instruistoj, kaj estas multe-uzata en niaj lernejoj. La gazetoj prezentas Sinjorojn Vorton kaj Helpon, Zak, Bonepart, hundon kun faldo, la inteligent-katoj kaj amason de aliaj interesaj kaj instruigaj roluloj.

Ni sincere dankas al S-ino Gossage de Auckland, pro ŝia afabla donaco de \$100 kiu firme establis la projekton finance; depost tio ĝi neniam hezitis; nur kelkaj semajnoj post unua presado la presad-kostoj estis rehavigitaj. Ne necesis uzi Ejanzan monon aŭ akcepti iun el la bonkoraj promesoj por pruntedono de mono. Numero unu preiĝis ĝis 1,000 ekzempleroj, numero du ĝis 1,500.

NEA mendis 60 de ĉiu numero, S-ro Markarian en Anglujo aĉetis 500 de ĉiu. "Heroldo" reklamis ĝin mallonge - ekzempleroj foriris al Aŭstralio kaj Japanujo.

PREZOJ DE EJANZ PRESAĴOJ:

Dono kun Oraj Fenestroj:	10c	Standardetoj:	20c
Prato, Tero kaj Aero:	10c	Ĉeno-ludo:	50c
Niaj Roluloj:	15c	Afiŝoj (VVV):	25c
Al la Savo:	15c	Glumarkoj:	20c
Tuta Leganto 1 aŭ du	10c por 1, 7c por pli ol 30,		
	po 6c por pli ol 100.		

KONKLUDO:

Sume, 1970 estis nur parte sukcesa jaro. Sukcesa precipe pro niaj presaĵoj, kaj plej grave, pro niaj okazaĵoj. Sed nur parte sukcesa, ĉar ni ankoraŭ vidas antaŭ ni en la aliaj sferoj de agado ne-prenitajn ŝancojn por agado. Kelkaj el la mankoj ni povos ŝtopi, aliaj ne, nuntempe. Nia ĉefa problemo estas manko de tempo kaj movebleco ĉe aktivuloj. Nia plej grava celo estas la vigligo de pli junaj membroj, akcepti pli da laboro kaj sekve ĝuon. Ni plej bone povas tion fari per kreo de spirito de Ejanz kaj per ĝia ofta rekreo kaj nutrado ĉiufoje kiam iuj el ni kunvenas por okazaĵo.

Laŭ tiu vidpunkto, 1970 estis elstara kaj pionira jaro, por Ejanz kaj finfine por la tuta movado. Ni certe rajtas fronti la novan optimisme!